

Svisa Esperanto-Societo

# informas

jaro 2008 numero 1-a: januaro-marto



Fotis Claude Gacond

Renkonto kun ibekso dum promenado sur la ĵurasa monto Creux-du-Van.

# Rememorigilo

## *SES informas*

### Redakcio :

Claude Gacond, CP 480,  
CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : [gacond@bluewin.ch](mailto:gacond@bluewin.ch)

Tel. : hejme: 032 926 52 32  
ĉe CDELI : 032 967 68 42

### Redaktaj kunlaborantoj:

Rolf Ernst, Nancy Fontannaz,  
Stefano Keller, Richard Schneller

## *SES informas*

### Redaktaj datlimoj

2008-2 : aprilo-junio :  
marto 10.

2008-3 : julio-septembro :  
junio 10.

2008-4 : oktobro-decembro :  
septembre 10.

2009-1 : januaro-marto :  
januare 10.

### **Konsultu la retejon de SES !**

[www.esperanto.to/ses](http://www.esperanto.to/ses)

## SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto,  
Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel. :  
032 932 18 88.

Retpoŝto : [mireille-grosjean@rpn.ch](mailto:mireille-grosjean@rpn.ch)

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, PF  
301, 8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25.

Retpoŝto : [info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch)

Stefano Keller, sekretario, CP 6034,  
1002 Lausanne. Tel.: 079 612 75 79.

Retpoŝto: [stefano.keller@kontakto.info](mailto:stefano.keller@kontakto.info)

Hans-Werner Grossmann, kasisto,  
Esperanto-Servo, PF 262, 4132  
MuttENZ 1. Tel.: 076 460 89 92.

Retpoŝto: [esperanto-servo@bluewin.ch](mailto:esperanto-servo@bluewin.ch)

### Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo 2300 La Chaux-de-  
Fonds

### Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*


Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

# Vivo de SES

2008-1 - redaktis Stefano Keller

## *Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo sabate, la 12-an de aprilo 2008*

*Berno, Kongresejo Allresto, Effingerstr. 20*



### **Invito al la jarkunveno 2008 en Berno**

UNO proklamis la jaron 2008 *Jaro de lingvoj* kaj komisiis UNESKO-n, kunordigi la agadon. UEA kaj la landaj asocioj partoprenas la kampanjon planante eventojn por disvastigi la mesaĝon de la ĝenerala direktoro de UNESKO, Koichiro Matsuura. La Jaro de lingvoj donas bonvenan okazon por informi pri Esperanto kaj ties rolo en la internacia komunikado. Tial ankaŭ la jarkunveno de SES traktos temon rilatan al la lingvoj.

### **Sabate, 12-an de aprilo 2008**

**Kongresejo Allresto**, Effingerstr. 20, Berno, perpiede 10 minutojn de la stacidomo (direkto Bubenbergrplatz-Hirschengraben-Effingerstrasse), aŭ per tramoj 3 aŭ 5 ĝis Kocherpark.

### **Programo**

- 11h00 «*Irado tra la lingvoj*» gvidota de Mireille Grosjean (Vidu prezenton post la Tagordo de la Ĝenerala Kunveno)
- 12h30 Tagmanĝo en aparta salono. Menuo kun aŭ sen viando (inter 15-20 CHF), elektebla surloke.
- 14h30 *Ĝenerala Kunveno de SES* laŭ anoncita tagordo.
- 16h30 Fino

Pro organizaj kialoj necesas anonci sin ĝis komence de aprilo ĉe Bruno Graf, Jurastr. 23, 3063 Ittigen, tel. 031 921.44.59, rete: [bgraf.o@bluewin.ch](mailto:bgraf.o@bluewin.ch). Dankon pro via atentemo kaj partopreno.

## Tagordo de la Ĝenerala Kunveno de SES

1. Salutado, konstato de la nombro de ĉeestantoj, informoj pri senkulpiĝoj
2. Evoluo de la membraro
3. Akcepto de la protokolo de la Ĝenerala Kunveno 2007 (Ĝenevo)
4. Vivo de la societo: akcepto de la estrarraporto (*aperos en SESi 2008-2*)
5. Financoj. Prezento kaj akcepto
6. UEA kaj ILEI: delegitoj.
7. Laboro plenumita de la estraro, projektoj 2008.
8. Nova svisa esperanto-revuo, perspektivoj de grupa - tutsvisa vivo.
9. Buĝeto 2008
10. Diversaĵoj

Proponoj al la tagordo devas atingi Mireille Grosjean, pf 9, 2416 Les Brenets, aŭ rete: [mireille.grosjean@rpn.ch](mailto:mireille.grosjean@rpn.ch) ĝis la 4a de aprilo 2008. Proponoj devas esti subtenataj minimume de tri personoj.

### Irado tra la lingvoj

matena programo de nia kunveno je aprilo 12 en Berno.



Interesa programo por mezlernejoj, gimnazioj kaj plenkreskuloj kompreneble. Ni promenados laŭ iu temo tra la lingvoj de ni konataj, unue esperanto, poste la germana kaj la franca, certe tra la angla, la itala kaj la hispana, kaj tra aliaj lingvoj laŭ la ĉeestantoj. Mi iom povos montri pri la japana. La temoj estos ekzemple la alparolo aŭ proksima aŭ ĝentila, kiel oni starigas demandon, ktp. Mi ne deziras ĉi tie tro precize priskribi mian prezenton, devas resti iom da surprizo !! Fine ni kune iom malkovros aspekton de la sŭahila lingvo.

Ĝis aprilo ! Mirejo Groĵan (Mireille Grosjean), fremdlingvoinstruisto

## Bilanco - Jarkalkulo - Buĝeto

N-ro	Konto	Bilanco		
		1.01.2007	31.12.2007	
1010	PostFinance	1'356.97	3'261.47	
1011	PostFinance: kasobligacio (fiksa depono)	7'000.00	7'000.00	
1030	WIR Banko	33'627.30	27'623.05	
1060	KCE: pruntedono	15'000.00	15'000.00	
1090	UEA: konto sesa-v (jarfine: € 36.91)	274.58	60.88	
1100	Inventaro	1.00	1.00	
1150	Federacia Adm. de Impostoj: antaŭimposto	158.95	177.10	
1300	Transaj aktivoj	375.00		
	<b>Sumo aktivoj</b>	<b>57'793.80</b>	<b>53'123.50</b>	
2000	Transaj pasivoj	1'710.00	660.00	
2100	Kapitalo (52'231.00 + 3'852.80 – 3'620.30)	52'231.00	52'463.50	
2400	Agado 2003/05	3'852.80		
	<b>Sumo pasivoj</b>	<b>57'793.80</b>	<b>53'123.50</b>	
		<b>Jarkalkulo</b>	<b>Buĝeto</b>	
		<b>2007</b>	<b>2007</b>	<b>2008</b>
3000	Informado, varbado (inkl. duono de SESi)	2'404.20	4'000.00	4'000.00
3001	Subteno eldono Svisa Enciklopedio	5'000.00	5'000.00	
3010	Omaĝoj, rimedoj	35.00	200.00	200.00
3020	Subvencioj, premioj, projektoj	1'540.00	2'000.00	2'000.00
3110	SES informas (duono de la kostoj)	2'028.80	2'500.00	3'000.00
3120	Kunvenoj, kunsidoj (ĜK, estraraj, regionaj)	466.00	700.00	700.00
3150	Abono al revuoj	150.00	150.00	150.00
3200	Kotizoj al UEA, EEU, ktp.	223.30	250.00	200.00
3210	Administrado (afrankoj, telefonkostoj, ktp.)	303.00	700.00	500.00
3220	Bank- kaj postspezoj	104.65	200.00	150.00
3230	Donaco al KCE	450.00	450.00	450.00
3500	Diversaĵo		300.00	300.00
	<b>Sumo elspezoj</b>	<b>12'704.95</b>	<b>16'450.00</b>	<b>11'650.00</b>
4200	Membrotizoj	5'090.00	5'000.00	5'000.00
4210	Abono al SESi sen membreco	525.00	700.00	500.00
4300	Donacoj, heredaĵoj	2'455.00	1'500.00	1'500.00
4600	Bank- kaj poŝtinterezoj	1'014.65	900.00	1'000.00
	<b>Sumo enspezoj</b>	<b>9'084.65</b>	<b>8'100.00</b>	<b>8'000.00</b>
	<b>Plielspezoj</b>	<b>3'620.30</b>	<b>8'350.00</b>	<b>3'650.00</b>

15.01.2008/HWG

## ***Donacoj ricevitaj en oktobro, novembro kaj decembro 2007***

***Sume: 1'275.- svisaj frankoj.***

Emmenbrücke (5); S-ino Marguerite Viredaz, Lausanne (25);

***Donacintoj:***

S-ino Marguerite Jaccard-Besson, Rolle (600); S-ro Claude Blanc, Renens (50); S-ro David Buhlmann, Prilly (60); D-ro Tazio & Teresita Carlevaro, Bellinzona (20); S-ino Verena Elsner, Zürich (15); S-ino Nancy Fontannaz, Pully (100); S-ino Mireille Grosjean, Les Brenets (150); S-ro Noël Huguenin, La Chaux-de-Fonds (20); S-ro Jean-Jacques Lavanchy, La Tour-de-Peilz (30); E-o Societo Lucerna, Kriens (200); S-ro Paul Scherer

***Nome de SES Hans-Werner Grossmann, la kasisto, dankas la donacintojn pro ties malavara subteno al nia societo.***

### ***Novaj patronoj, 2007***

S-ro Jean-Jacques Lavanchy, La Tour-de-Peilz kaj S-ro Fritz Wassmann, Hinterkappelen.

## ***Rilatoj kun altaj instancoj en la kantonoj kaj je tutsvisa aŭ eĉ internacia nivelo***

La lokaj grupoj havas sian vivon, la individuoj havas siajn rilatojn. Bonege. Sed atentu! Se vi havas rilatojn al altnivelaj instancoj je kantona aŭ federa niveloj pri esperanto, devus esti informo al la estraro de SES. Kial? Ĉar povas esti samranga ekrilato en alia kantono, pri kiu vi nenion scias, kaj pri kiu la estraro scias. Kaj la politikistoj aŭ diversaj instancoj havas kontaktojn inter si kaj alparolas unu la alian. Do informo de la estraro helpas al pli bone organizitaj kontaktoj kaj konsekvence al pli bona varbado. Estas unu el la multnombraj taskoj de la estraro kunordigi tiajn farojn.

Plie indas, eĉ endas, ke iu ne iru sola al moŝtulo, sed ĉiam iru du aŭ tri personoj kune. Dum la diskuto ofte iu paneas kaj la alia povas interveni. La alparolito povas trovi pli bonan kontakton kun iu persono kaj malpli bonan kontakton kun la alia. Pri tio oni ne povas scii antaŭe. Do se iras tri, estas elektableco. Bonvolu atenti pri tio kaj agi laŭ tiu modelo. Kun elkoraj antaŭdankoj.

Mirejo Groĝan (Mireille Grosjean), kun-prezidanto de SES

# Tutsvisa aktiveco

## CDELI

**Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia**  
Bibliothèque de la Ville, Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds  
Tel. : 032 967 68 42.

Retadreso : [claudio.gacond@ne.ch](mailto:claudio.gacond@ne.ch), [martine.schneller@ne.ch](mailto:martine.schneller@ne.ch), [nancy.fontannaz@ne.ch](mailto:nancy.fontannaz@ne.ch)

### Venontaj stud-aranĝoj !

**Didaktika stud-sabato** okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Instruas Monika Molnar, Claude Gacond, Nancy Fontannaz kaj Luc Allemand. Rezervu la sekvajn sabatojn : **februare 16, marte 15, aprile 19, junio 21** (studo en la naturo), **oktobre 18, novembre 15**.

**Kultura seminario** okazas principe la unuan sabaton de la monato en neferia periodo. Rezervu la sekvajn sabatojn : **februare 2, junio 7, oktobre 4, novembre 1, decembre 6**. La celo de tiu seminario, kiu disvolviĝas sub la aŭspicio de SES, ILEI kaj UEA, ne estas la studo mem de la lingvo, sed kleriĝo koncerne al la historio kaj al la literaturo de esperanto. Partoprenintoj al 15 tiaj sabatoj estos rekompencitaj per ricevo de atestilo. Ĉi-sezone ni dediĉas nian atenton al la revuo *Literatura Mondo*, kaj al la verkistoj, kiujn ĝi kunigis kaj diskonigis, kaj al la decidiga influo,

kiun la budapeŝta skolo havis por la gramatika stabiligo de esperanto.

### Horaro de ambaŭ aranĝoj

10.00 : Malfermo, eblo aĉeti librojn, babili kaj kafumi.

**10.45 : Oficiala malfermo**, formiĝo de la stud-rondoj. 11.00 : Studo. 11.45 : paŭzo. 12.00 : Studo. 12.45 : foriro al tagmanĝo. 14.15 : Studo. 15.00 : paŭzo. 15.15 : Studo. **16.00 : Konkludo** kaj teumo, librovendo. **17.00 : Oficiala fermo**.

Aliĝo : **Por faciligi la organizon de la studaj kaj seminariaj sabatoj** ĉiu bonvolu nepre antaŭanonci sian partoprenon almenaŭ ĝis la ĵaŭdo antaŭ la koncerna aranĝo al Nancy Fontannaz : **telefone : 021 728 31 27 (kun respondilo) aŭ rete : [nancyfontannaz@freesurf.ch](mailto:nancyfontannaz@freesurf.ch)**.

**Partopren-kotizo** : Por minimuma kovro de la elspezoj la partoprenkotizo estas po Fr. 15.- por partopreno en la stud-sabato (senpage por studentoj) kaj po Fr. 20.- por partopreno en la sabata seminario (duonpreze por studentoj).

### Raporto pri la aktiveco de CDELI en 2007

La laboro de la bonvolaj kunlaborantoj de CDELI estas tiel organizita: S-ro Claude Gacond okupiĝas pri la

kontaktoj kun la esplorantoj, vizitantoj, eldonantoj kaj donaculoj, kunordigas la aktivecon de la kunlaborantoj, planadas la kursojn kaj seminarion por la publiko lernanta esperanton. Li organiziĝas, por ke la bibliotekistino povu dediĉi la ĉefan parton de sia tempo al libro-katalogado en RERO. Tiel s-ino Martine Schneller en 2007 povis krei 491 novajn noticojn. Tio sumigas la CDELI-noticojn en RERO al 4384, kio respondas al dekmilo da bibliografaj eniroj libraj kaj broŝuraj. Konservigis en CDELI seeble po 3 ekzempleroj de ĉiu verko, la tria povanta forlasi la bibliotekon profite al interbiblioteka elprunta servo. La CDELI-kolektoj esploreblas surloke en la salono de CDELI aŭ en la legejo de la Biblioteko.

S-ino Andrée Gacond registras la periodaĵojn. S-ino Monika Molnar, el La Chaux-du-Milieu, zorgas pri arkivaĵoj per la sistemo Archibase kaj gvidas la instruadon de esperanto je la supera nivelo. S-ino Nancy Fontannaz, el Pully, okupiĝas pri la libro-servo, pri la kontaktoj kun la studantoj, pri la sekretariado de la esperanto-kursoj kaj pri la listigo de la publikaĵoj ne posedataj de CDELI, cele al ties iom-post-ioma akirado. S-ro Stefano Keller, el Lausanne, alportas sian komputikan konon serve al la katalogado de la periodaĵoj de CDELI en la interreta sidejo [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch).

En 2007 la kunlaborantaro de CDELI riĉiĝis je nova helpemulino. La juristino kaj patrino Béatrix-Koleva, el Crêt Pellaton ĉe Travers, transprenis la registradon de la

gazet-artikoloj dediĉitaj al esperanto kaj interlingvistiko. Tiu servo fakte paneis, ekde kiam s-ino Gabrielle Gacond devis ĉesi sian kunlaboron pro maljuniĝo.

La sabaton 1-an de decembro disvolviĝis amika kunveno de dudeko da amikoj kaj kunlaborantoj de CDELI kaj de la Biblioteko por festi la 62-jariĝon de la bibliotekistino Martine Schneller, sed konsekvence ŝian bedaŭrindan emeritigon. Tiam anonciĝis la kreo de asocio Amikoj de CDELI, paralela al tiu de la Amikoj de la Biblioteko, kies ĉefa celo estos la serĉado de monhelpoj kaj apogoj, kiuj ebligu revenigi la emeritan bibliotekistinon Martine Schneller por la plua katalogado en RERO de la libraro de CDELI. La ekemeritino en humurplena parolado rakontis la etapojn de sia laboro en CDELI startinta en la jaro 2000 per bonvola helpo trimonata. Ŝi atentigis pri la graveco je universitata nivelo de la sliparo de CDELI daŭre ne konsultebla en RERO. Ĉiuj esprimis al s-ino Martine Schneller la dankemon de CDELI por la plenumita laboro kaj la esperon, ke tiu aktiveco povos pludaŭri laŭ nova formulo.

Kun niaj dankoj laŭ landnoma alfabeto jen la listo de la donacintoj, kiuj riĉigis la kolekton de CDELI en 2007: Aŭstrio: s-roj Gerard Cool en Leibnitz kaj Walter Klag en Vieno; Ĉinio: El Popola Ĉinio en Beijing; Francio: s-roj André Cherpillod en Courgenard kaj Reinhard Haupenthal en Malaucène; Germanio: s-roj Detlev Blanke en Berlino, Bernhard Eichkorn en Messkirch, Peter Kühnel en Berlino, Berlina Esper-



anto-Ligo, Saksa Esperanto-Biblioteko en Dresden; Israelo: s-ino Luiza Carol en Kiriath-Yam; Japanio: Japana Esperanto-Libro-kooperativo en Toyonaka kaj s-ro Usui Hiroyuki en Tokio; Litovio: s-ro Antanas Mekys en Vilnius; Nederlando: s-ro Wim Jansen en Katwijk kaj Universala Esperanto-Asocio en Rotterdam; Portugalio: s-ro Gonçalo Neves en Montico; Serbio: la Svisa Ambasadego en Beograd; Svislando: f-ino Raphaela Cueni en Laufen, s-roj Claude Gacond en La Chaux-de-Fonds, Ernst Glättli en Brugg, Stefano Keller en Lausanne, Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds, s-ro Willy Nuësch en Bern, s-ino Martine Schneller en Neuchâtel, s-roj Richard Schneller en Kronbühl kaj Giorgio Silber en La Chaux-de-Fonds.

*La Svisa Enciklopedio Planlingva: Universalaj Lingvoj en Svislando*, verko 1129-paĝa eldonita je 500 ekzempleroj far CDELI kaj SES, redaktita de la historiisto Andreas Künzli, grandparte dank'al la dokumentaro de CDELI, definitive eldoniĝis la 27-an de decembro 2006. Ekde la komenco de la jaro 2007 la aktiveco en CDELI organiziĝis por kontentigi la antaŭmendojn (kiuj superis la centon) kaj dum la unua trimestro tio estis unu el la ĉefaj aktivecoj de s-ro Claude Gacond kaj de la SES-kasisto Hans Grossmann.

La sabataj kursoj kapablis disvolviĝi je la kontentigo de la studentoj. Ekster la feriperiodoj la trian sabaton de la monato disvolviĝas esperanto-instruado je tri niveloj, kaj


la unuan sabaton de la monato kultura seminario. Tiuj didaktikaj renkontoj kunigas ĝis po 30 partoprenantoj venantaj el Svislando kaj kelkfoje el aliaj landoj. Nian dankemon direktiĝas al la Duagrada Lernejo, kiu disponigas al ni du klasojn, kiam ekzistas pluraj studrondoj. La germana interlingvisto Reinhard Haupenthal, nun vivanta en Francio en Malaucène, prezentis la personecon de Johann Martin Schleyer, la aŭtoro de Volapük. Tiu seminario, kiu kunigis dudekon da personoj, disvolviĝis la 1-an de septembro en la salono Charles Humbert de la Biblioteko.

La parlamentaninoj Gisèle Ory, deputito en la federacia Ŝtat-Konsilantaro kaj Francine John-Calame, deputito en la federacia Nacia Konsilantaro, kandidatigis Universalan Esperanto-Asocion por la Nobel Pac-premio 2008. Tiu asocio, kiun fondis en 1908 la ĝenevano Hector Hodler, la filo de la pentristo Ferdinand Hodler, fakte efike laboris neperforteme favore al la interhoma kunekzisto. Helpe de s-ino Mireille Grosjean, kunprezidanto de SES, estas ĉe CDELI mem, ke ambaŭ parlamentaninoj organizis je la ĵaŭdo 22-a de novembro sian gazetaran konferencon, kiu venigis signifan nombron da ĵurnalistoj kaj rezultigis gazetare, radie kaj televide valorajn artikolojn kaj elsendojn, en kiuj menciigis la graveco de CDELI mem en la Biblioteko de La Chaux-de-Fonds.

Vizitantoj kaj esplorantoj venis al CDELI en 2007 el la sekvaj landoj: Bulgario, Francio, Germanio, Hun-

gario, Israelo, Italio, Japanio, Kameruno, Pollando kaj Svislando.

La idistino s-ino Clara Kreis-Schneeberger, naskita la 20-an de novembro 1907, kiu la 3-an de aprilo 1974 subskribis konvencion kiel naŭa donacanto al CDELI, mortis centjaraĝa en Ĝenevo kaj s-ro Tazio Carlevaro plurfoje veturis el Bellinzona al Ĝenevo por kolekti librojn, periodaĵojn kaj arkivaĵojn restintajn en Ĝenevo. Tiu dokumentaro kompletigos la gravan libron Li-CK en CDELI.



# SAT en Svisio

La landa peranto de SAT en Svisio estas Richard Schneller, Höhenstrasse 1 b, 9302 Kronbühl. Poŝta konto 25-158577-1.

[rischneller@gmail.com](mailto:rischneller@gmail.com).

## Loka vivo

### Basel

**Esperanto-Societo Basel**

PF 103, 4005 Basel

Tel. : 0049 76 214 57 12.

Kunvenoj : 20.00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

### Temoj kaj okupoj de la venontaj kunvenoj

**Februare 12** : Karnavalo.

**Februare 28** : Angla vespero.

**Marte 27** : Ludo /Scrabble.

**Aprile 24** : Filmo : Gerda malaperis.

**Maje 29** : Prelego.

**Junie 26** : Grün' 80.

**Julie 17** : Salat-bufedo ĉe s-ino Nicole Béroud-Focke.

**Aŭguste 24** : Ekskurso kaj kradrostado en Bettingen.

**Septembre 25** : Rakontoj pri la ferioj.

**Oktobre 23** : S-ro Rainer rakontas pri Skandivania.

**Novembre 27** : Pretigo de la programo 2009.

**Decembre 13** : Zamenhofa festo en Bazelo.

### Raporto pri la jaro 2007

La jar-raporto 2007 de Esperanto-Societo Basel aperinta en *Sud-Rejna Kuriero*, N<sup>o</sup> 29, januaro 2008 citindas. Jen do iom resume la ĉefaj eroj de tiu dokumento :

En januaro 2007 okazis ne nur la ĝenerala jar-kunveno de la societo, sed ankaŭ vizito de brazilano nomata Luca, kiu prelegis pri sia lando. Li estis gajninta konkurson, kies premio estis vojaĝo tra Eŭropo dum 6 monatoj.

Februare kaj marte disvolviĝis du babilaj rondoj kaj aprile s-ro Hans-Peter Senn prezentis tre belajn bildojn pri agavoj.

En majo la grupanoj forlasis sian kelan kunvenejon por viziti sian prezidintinon Erna Döring en ties oldulejo.

Kvankam la vetero ne belis, la junia renkonto en Grün' 80 tamen tre agrable sukcesis. Kaj la grupanoj festis la naskiĝtagon de sia samideanino Nina Drewitz per krad-rost-umo ĉe s-ro Hans-Peter Senn.

La somera ekskurso celis la alzacan Ekologian Muzeon. Ĉiuj surpriziĝis, kiel agrable kaj kviete ili kapablis imagi la vivon en la pasinteco en la diversaj domoj rekonstruitaj tie. Ŝipa veturo, karuzelado kaj pupteatraĵoj beligis tiun renkonton, sed, apenaŭ rehejmiĝintaj, la grupanoj aŭdis kun tristeco pri la forpaso de sia prezidintino Erna Döring. Kvankam ŝi ne plu kapablis frekventi la kunvenojn, ĉiuj konservis viglan kontakton kun ŝi, vizitante ŝin regule.

Septembre en agrabla rondo manĝeme renkontiĝis la grupanoj ĉe s-ino Annelies Fiechter por gustumi 'Älplermakronen'. Tradicie la oktobra kunveno estas dediĉita al prieriaj rakontoj kaj la novembra al la programado de la sekva jaro.

En decembro la zamenhofa festo disvolviĝis en Rixheim per vizito de ĉarma kristnaska bazaro kaj de la impresiga tapeto-muzeo, kaj en la restoracio Le Cygne la Bazel-anoj kaj Mulhouse-anoj kune kafumis kaj biskvitumis aŭskultante interesan prelegon de s-ro André Grossmann pri la lasta UK en Japanio. Kaj s-ro Michel Basso, prezidanto de TAKE, raportis pri vasta projekto de arbo-plantado en Bona Espero en Brazilo. La magiisto Frédéric mirigis la festantojn kaj s-ro Manfred Westermeier raportis pri kultivado de urtikoj enkonduke al la festa manĝo de alzacaj specialaĵoj, kiu konkludis tiun agrablan tagon.

La raporto iom pesimisme konkludiĝas, atentigante ke malgraŭ sia aktiveco la grupo ne vige progresas, kio ne estas tre kuraĝiga por la gvidantoj.

# Genève

## Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 734, 1212 Grand-Lancy 1

Espéranto-Infos : Tel. : 022 740 04 45.

La kunvenoj okazas en Maison des Associations, rue des Savoises 15.

## Venontaj kunvenoj

**Februare 5** je la 20a horo en la salono Jacquard, Maison des Association. Temo: Japaniokaj la UK. Parolos Dorothée kaj Carlo Baumgartner.

**Marte 4** : Ĝenerala asembleo.

## ***Limsaltanta Folio***

El la regiono ĝeneva venis al ni la unua numero de *Limsaltanta Folio*, organo de la asocio *Espéranto-Genève-Régions*, kies sidejo troviĝas en Saint-Genis-Pouilly en Francio apud Meyrin en Svislando. Tiu translima asocio celas plifaciligi kontaktojn inter la grupoj esperantistaj en Pays de Gex, Ĝenevo kaj Rodanalpo.

# Kantono de Neuchâtel

## **La neŭŝatelaj lernantoj kantis ankaŭ en esperanto**

En CDELI nun konsultebblas la CD-disko titolita « *Noël... Noël* » *Les écoliers neuchâtelois chantent accompagnés par l'Orchestre de Chambre de Neuchâtel*, kiu estis registrita la 5-an de decembro 2007 okaze de la koncerto okazinta en Neuchâtel. Enkonduke al la jaro de la lingvoj, por reliefigi la multlingvecon de la neŭŝatelaj gelernantoj, la muzikisto Steve Muriset ne nur kontentiĝis kantigi kristnaskajn kanzonojn en la franca, sed ankaŭ angle, itale, portugale, hispane, germane, kaj ankaŭ esperantlingve. Tiel aŭde kaj lege la neŭŝatela lernantaro kaj ties instruistaro kaj familianoj povis ekkonscii pri la ankaŭa ekzisto de esperanto en nia multlingva socio. Sub la kunordigo de

Bernard Contesse, la delegito al la neŭŝatela muzika eduko, partoprenis tiun kantaventuron lernejoj korusoj de la komunumoj Boudevilliers, Corcelles, Enges, Fontainemelon, Fontaine, Hauterive, La Chaux-de-Fonds, Le Cerneux-Péquignot, Le Landeron, Le Locle, Le Pâquier, Les Verrières, Les Ponts-de-Martel, Lignières, Montmollin, Neuchâtel, Peuseux, Savagniers, St-Blaise, St-Sulpice, Valangin kaj Vilars. Entute milo da gelernantoj.

## **La Chaux-de-Fonds Vesperaj kunvenoj ĉe CDELI**

**En via agendo nepre notu la datojn de la venontaj grupaj kunvenoj vesperaj: februare 13, marte 11 kaj junio 11.** Tiuj kunvenoj estas dediĉitaj al ĉiuj esperantistoj de la kantono de Neuchâtel dezirantaj plilertiĝi en la praktiko de esperanto per paroligaj ludoj, prelegetoj, diskutoj, legaj kaj festaj momentoj. En la februara kaj marta renkontoj spektiĝos esperanto-filmoj en posedo de CDELI. Por la kovrado de la elspezoj la partoprenantoj ŝuldas po frankoj 4.- por vespero.

Ĉar vespere la enira pordo de la biblioteko estas ŝlosita, premu la sonorilan butonon de CDELI, kiu troviĝas dekstre de la norda enirpordo de la biblioteko kaj iu venos por liftigi vin supren al la CDELI-salono. Horaro: Alveno eblas ekde la 19.30. Grupa kunveno de la 20.00 ĝis la 21.30. Fermo de la salono je la 21.45.

-oOo-

# Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel: 021 657 14 56

[esperanto@isuisse.com](mailto:esperanto@isuisse.com)

<<http://www.esperanto.ch/Lausanne>>

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20.00.

## Venontaj kunvenoj

Februare 4 : Ĝenerala asembleo.

Marte 3.

Aprile 7.

Maje 5.

## Raporto pri la zamenhofa festo

La dimanĉon 15an de decembro ĉirkaŭ 30 personoj kunvenis en la arbara rifuĝejo de Etoy antaŭ varma ligno-hejtilo. Ĉiuj estis agrable surprizitaj : afabla familio (gepatroj kun 1 infano kaj 1 adolesko) el Argovio partoprenis nian feston. Ili eĉ alportis al ni frandan hungaran papavan kukon.

Mara Bartoli bele ornamis buntan tablon kaj dum tagmanĝo gustumiĝis diversaj specialaĵoj alportitaj de la partoprenantoj : salatoj, ŝinkaj lunarkaj bulkoj, legomaj kaj fromaĝa tortoj, papavaj, pomaj kaj ĉokoladaj kukoj, fruktsalato, biskvitoj kaj spica teo.

Ni animis la posttagmezon per legado kaj muziko. Hazarde lotumiĝis personoj, duope aŭ triope, por prepari legadon de diversaj tekstoj pli malpli facilaj kaj seriozaj, elektitaj de Dominique de Mestral. Kiel

legeblas ĉi-sube, esperanto ne estas nur interpersona komunikilo, sed estigas tiom da belaj poemoj, kiom da beletraj tradukoj, kiel la fama deklamaĵo de Hamlet de Ŝekspiro "Ĉu esti aŭ ne esti ?" aŭ tiu poemo verkita en esperanto de William Auld : *Al mia amatino neesperantista* :

Eklerni esperanton vi evitas :  
tre bone, kara, scias mi la kaŭzon  
de tio, ke vi kvazaŭ sentas naŭzon,  
kiam mi ion esperantan citas.

Ho jes ! Ĉu kredas vi, ke mi ne vidas  
tiun subitan spasman spiropaŭzon ?  
Pri l' lingvo sentas vi ĵaluzotaŭzon,  
ke mian amon vi kun ĝi dividas !

Kara, pripensu : ĉu ne bone estus  
se pri la aferet' vi ne kontestus,  
sed entreprenus Zamenhof-ekzercojn ?

Ĉar tiam vere vivus vi pli home,  
kaj sentus kun, ne kontraŭ mi – kaj krome,  
vi poste povus legi miajn versojn.

Sen forgesi tiun pecon el *Infero* de Dante Alighieri :

Je l' vojomez' de nia vivo tera  
mi trovis min en arbareg' obskura  
ĉar perdiĝinta estis vojo vera.

Ho, ve eĉ diri, kia lok' terura  
estas ĉi kruda, pena dens' arbara,  
revekas timon eĉ memoro nura,

Eĉ mort' apenaŭ estas pli amara.  
Sed traktos mi pri renkontita ĉio,  
por ke l' trovita Bono iĝu klara.

Kiel alvenis mi ? Sen propra scio.  
Mi vagis tiam tiel song'-gravede,  
de l' ĝusta voj' mi trafis al devio.

Aŭ pli malpezan *Versaro* de Marjorie Boulton pri **um**-vortoj el *Faktoj kaj Fantazioj* :

UM estas vortopec' sufiksa  
Utila, sed sen senco fiksa.

Do (ne necesas nin konsterni !)  
 Vortojn kun *-um* ni devas lerni.  
*Kolumo* estas vesto kola ;  
*Brakumon* mi ne provas sola ;  
*Laktumo* estas fiŝa semo,  
*Kortumo* parto de l'sistemo  
 justica ; se ni tre *cerbumos*,  
 eble kompreno fine *lumos*.  
 Plandum' kaj *kalkanumo*,  
 du, ambaŭ situas sur la ŝu'  
 En ĉambro ne *aerumita*,  
 spritulo trovas sin malsprita.  
*Ventumas* ni, se estas varme -  
 Eble per *ventumilo* - ĉarme !  
 Vera saĝo ne *saĝumas* ;  
 Frandaĵojn ni kun ĝoj' *gustumas* ;  
*Nazumo* dum surnaza sido  
 helpas okulojn pri la vido.  
*Buŝumo* hundan buŝon tenas,  
 Sed kvin *sentumoj* hundon benas.  
 (La flaro plej por hundo gravas,  
 sed vido por la hom' pli ravas.)

Ĉiu leganto klopodis legi sian  
 tekston kiel aktoro, ridigante aŭ  
 provante kapti la aŭskultantojn.

Post tiu cerbumado, sub la ritma  
 mano de Elisabeth de Mestral, nia  
 koruso kantis gaje kvarvoĉe tiujn  
 svisajn tradiciajn kantojn :

Ege simple nur ami ! *C'est si simple  
 d'aimer !*

La Jodlado. *La Youtse*.

La Bovina vico. *Le Rang des vaches*.

La Vinberisto. *Le Vigneron*.

La voĉgrupo invitis ankaŭ la ĉe-  
 estantojn kanti kune

La Malnova lignodom'. *Le Vieux chalet*.

Finposttagmeze varmaj bondeziroj  
 inter ĉiuj fermis tiun plezurigan  
 zamenhofan feston.

Elisabeth de Mestral

-oOo-

# Luzern

## Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj :

Restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr. 8,  
 6020 Emmenbrücke.

Restoracio Bellini (hotelo Continental-  
 Park), Murbacherstr. 4. Tel.: 041 228 90 50

Ĉe gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimat-  
 weg 4, 6003 Luzern. Tel. : 041 210 25 88.

## Venontaj kunvenoj

**Februare 09 (sabate)** : Restoracio  
 Emmenbaum, Emmenbrücke 10h00.  
 Ĝenerala Kunveno de LES.

**Marte 05 (merkrede)** : Restoracio  
 Bellini 14h00-16h00: Konversacia  
 rondo kun Paul Scherer.

**Aprile 02 (merkrede)** : ĉe ges-  
 roj Anna & Koni Rey 14h00: Paroliga  
 leciono kun Sonja Brun, 14h30: Sci-  
 indaĵoj kaj originalaĵoj el la pasinto  
 de Lucerno kun Annelies Dettling.

**Maje 07 (merkrede)** : Restoracio  
 Bellini 14h00-16h00: Konversacia  
 rondo kun Paul Scherer.

**Junie 11 (merkrede)** : ĉe ges-  
 roj Anna & Koni Rey 14h00 : Paroliga  
 leciono kun Sonja Brun, 14h30 :  
 Henri Dunant – samtempulo de L. L.  
 Zamenhof, kun Koni Rey.

**Julie 09 (merkrede)** : Restoracio  
 Bellini 14h00-16h00: Konversacia  
 rondo kun Paul Scherer.

**Aŭguste 08 (vendrede)** : Vespera  
 ekskurseto kun Koni Rey.

**Septembre 03 (merkrede)** :  
 Restoracio Bellini 14h00-16h00:  
 Konversacia rondo kun Sonja Brun.

**Oktobre 01 (merkrede)** : ĉe ges-roj Anna & Koni Rey 14h00: Paroliga leciono kun Paul Scherer, 14h30 : Ludado kun Sonja Brun (ĉiu prezentu ludon).

**Novembre 12 (merkrede)** : Restoracio Bellini 14h00-16h00: Konversacia rondo kun Sonja Brun.

**Decembre 10 (merkrede)** : ĉe ges-roj Anna & Koni Rey 14h00: Zamenhofologio kaj programo 2009 kun Paul Scherer.

**2009 januare 07 (merkrede)** : Restoracio Bellini 14h00-16h00: Konversacia rondo kun Sonja Brun.

# Wil

**Esperanto-Klubo Wil**  
[www.esperanto.ch/wil](http://www.esperanto.ch/wil)

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder, Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel. : 071 393 41 49. [chaves-walder@bluewin.ch](mailto:chaves-walder@bluewin.ch) kaj Wolfram Fischer. Steigstrasse 12, 9116 Wolfertswil. Tel. : (P) 071.390.04.48 (O) 071.390.04.44. Fax : 071.390.04.47.

Kunvenoj : la unuan merkredon de la monato je la 19.00 en la Restoracio Schweizerhof, Bahnhofstrasse 18 (piedire je kvin minutoj oriente de la stacidomo).

# Zürich

**Esperanto-Societo Zürich**  
(Adreso: Akazienstrasse 6, Poŝtfako 858, CH-8034 Zuriko)

## Tradicia Zamenhoffesto

Vendredon la 7-an de decembro 2007 ni festis nian tradician Zamenhof-feston en familieca kadro per spagedumado. Ĉeestis Armin

Weidmann, Elisabeth Eisenegger kaj la familioj Weidmann kaj Binder. Ni ĝuis amikan vespermanĝon kaj babiladon kaj komune antaŭĝojis al la baldaŭa NR.



## Programo

**Vendredon, la 8-an de februaro 2007, 18.00: 103. Ĝenerala Kunveno en Esperantejo**


### Tagordo:

1. Protokolo de la lasta Ĝenerala Kuveno
2. Raporto de la estraro
3. Raporto de la kasistino kaj de la kaskontrolantoj
4. Senŝarĝo de la estraro
5. Elekto de la kaskontrolantoj
6. Fikso de la kotizoj
7. Buĝedo
8. Decido pri proponoj
9. Diversaĵoj

**Informojn pri la aktuala programo de Esperanto-Societo Zuriko vi trovos en la reto sub:**

**[www.esperanto.ch/zuriko/programo.html](http://www.esperanto.ch/zuriko/programo.html)**

-oOo-



# Kongresen

## Du raportoj pri la Novjara Renkontiĝo en Föckinghausen apud Meschede

La Svisa delegacio en Föckinghausen, la 2-an de januaro 2008



Fotis Mara Bartoli

Dum la novjara renkontiĝo de la asocio Esperanto-Land en Föckinghausen partoprenis 21 svisoj! La svisoj estis do la 3-a plej granda delegacio inkluzive de la gastlando. La renkontiĝo estas unika pro sia familia etoso: Preskaŭ la duono de la gepartoprenantoj estas gejunuloj kaj infanoj. Estis riĉa programo kaj por gejunuloj kaj por infanoj kaj por plenkreskuloj. Wolfram Fischer pretigis kun la infanoj teatraĵon, kaj la gejunuloj ĉiu-tage pretigis filmeton. Okazis diversaj ekskursoj al la regiono kaj nature ankaŭ la novjara promenado ne povis manki. La infanoj estis absolute entuziasmaj kaj la gepatroj vidis siajn infanojn praktike nur ankoraŭ dum la manĝo-tempo. Okaze de la renkontiĝo ankaŭ okazis „pintkonferenco“ de la svisaj Esperanto-familioj kaj de la gekunprezidantoj de SES kaj ni decidis, ke venontjare ni okazigos en Svislando almenaŭ unu semajnfinojn por esperantaj familioj kun infanoj.

Dietrich Weidmann



Kiam ni eklernis Esperanton, ni aŭdis pri la tre ŝatata Novjara Renkontiĝo en Germanio. Nun, du jarojn poste, la tuta familio ĉeestis sian unuan renkontiĝon kun preskaŭ 150 personoj de pli ol dekvin landoj kaj vere uzis la lingvon. Ni travivis tre belan, interesan semajnon. Sed, jen la komenco :

Plenŝtopita. La veturilo estas plenŝtopita de multe da vestaĵoj (ni iros norden, eble neĝos, ion por la anoncita novjarfesto kun dancebleco...); kartona tubo, skribiloj, tukoj por la infanaj programpunktoj, vortaroj - ĉu ni prenos la unu-kilograman PIV ? medikamentoj (la ideo resti kun gorĝdoloroj enlite anstataŭ praktiki Esperanton timigas min) kaj pikniko por la dekhora vojaĝo. Ne nur la aŭtomobilo estas plenŝtopita, ankaŭ niaj kapoj. La infanoj bone memoris, eĉ laŭte ripetis, kelkajn "granda Mazi" frazojn. Mi ne certas, ĉu "arestu lin", "mi ŝatas horloĝojn" kaj "la reĝino estas dika" ebligos trovi novajn amikojn...

En mia cerbo blinkas gramatikaj reguloj – eĉ se mi tre multe legis lastatempe, mi ne plu memoras pri "n", "iĝ" kaj "ig" (se mi ne sukcesos interparoli kun alilandanoj, gorĝdoloro povos esti vera solvo...). Mia edzo estas la plej trankvila – unue ni iros tien, due ni vidos !

La renkontiĝo okazas en malgranda plurdoma vilaĝeto. Komence ni sentas nin iomete apartaj. Impresas, ke ĉiuj konas sin kaj scias bone, kiel funkcias la organizo de tiu semajno. Sed tre rapide ni komencas babili, unue iomete timeme, sed post ĉiu horo kun pli da sekureco. La diversaj program-punktoj helpas sendube la interparolon. Plenkreskuloj, gejunuloj kaj infanoj havas diversajn semajn-programojn. La tuta familio ĝojas pri la diferencaj proponoj : Trafika politiko, paroligaj ekzercoj, prelegoj, Panalotos-fluto, Vikipedio ktp por ni. La gejunuloj faras ĉiutage filmon, kiu estas prezentata vespere. Manlaboroj, kantoj kaj teatraĵo por niaj knaboj. Ili akceptas eĉ ludi roleton en la teatraĵo, kiu temas pri kverelo inter du popoloj pri la "ĉielbendo" kaj la "ekbrilarko". Kelkfoje estas malfacile elekti kion fari ! Ĉu mi iros al la ekskurso aŭ ĉu mi restos simple trankvile en la kafejo ? Por la granda ĝojo de mia edzo troviĝas ankaŭ libroservo de Belgio surloke. Ni bezonas materialon por progresi...

La etoso estas tre agrabla. Ni ludas, laboras, ridas, dancas, eĉ kverelas kaj evidente oftege diskutas. Ni multe ĝojas ekkoni aliajn svislandanojn (dudek partoprenantojn !), paroli per kaj pri Esperanto en Svislando, eĉ fari kelkajn projektojn por la futuro. Ĉu ni vere devas iri en la nordon de Germanio por fari tion ?!

Post tiu semajno "papa" iĝas "paĉjo" kaj mi iĝas "panjo". Nun ankaŭ niaj infanoj havas la "Esperanto-viruson" kaj ni hezitas partopreni la printempo-renkontiĝon...

Dum ni reveturas hejmen (kompreneble la aŭtomobilo estas pli plenŝtopita ol antaŭ kelkaj tagoj...) nia knabeto vokas : " Vidu la ĉielbendon !" La pli aĝa tre saĝe respondas simple : " Ekbrilarko."

Mara Bartoli

# Morto

## Claude Piron

1931 - 2008



Fotoj el la Svisa Antologio Planlingva

La 22-an de januaro, kiam mi finredaktis tiun ĉi numeron 2008-1 de *SES informas*, subite rete kaj telefone alvenis tristega mesaĝo : « *Claude Piron mortis !* » Kardi-halto fakte bruske metis finon al la multfaceta kaj tiom utila kaj efika aktiveco de nia ŝatata samideano.

La adiaŭa funebra meso, pro la abundo de la publiko, disvolviĝis la vendredon 25-an de januaro ne en la anoncita katolika kapelo de Gland, sed en la protestanta preĝejo de tiu vilaĝo. Konklude al la ceremonio Mireille Grosjean, nome de SES, esprimis la tristecon de la svisa esperantistaro kaj prezentis la vicprezidanton de UEA, Ranieri Clerici, veninta el Italio por alporti la sekvan mesaĝon de Probal Dasgupta, la prezidanto de UEA :

*Claude Piron estis inter la ege multaj esperantistoj, kiujn mi konis kiel referencajn personojn enkorpigantajn la lingvon mem. Tia kono por multaj baziĝas simple sur liaj verkoj. Sed mi havis la bonan ŝancon esti en tre longdaŭra koresponda rilato kun li. Ni komencis diskuti mian malnetan angligon de lia fama eseo pri tio, ĉu Esperanto fakte estas azia lingvo, kaj el tio rezultis priteoria dialogo.*

*Tamen mi ne tro okupiĝu nun pri mia propra aliro – ni ĉiuj, pere de liaj tekstoj kaj pli lastatempe pere de lia rete havebla*

*voĉa produktaro, havis konon de lia profunda kapablo konkrete interesiĝi pri difinitaj homoj kaj aferoj kaj surbaze de tiu konkreta interesiĝo esprimi plej simple la plej profunde pripensitajn reagojn al tio, kion li perceptis. Aparte vastan konantaron havis Claude Piron pro tio, ke ankaŭ liaj krimromanoj esprimis same lucide liajn ideojn pri la homeco.*

*Piron ne nur en teorioj kaj romanoj, sed en sia vivlonga praktikado, prezentis al ni ĉiuj la arton percepte rilati al konkretaj personoj kaj pejzaĝoj, ŝanĝi sin mem per tiuj perceptoj, kaj distili la rezulton en simplan, konscie lingvan prezenton de sia aliĝo. En Piron, tiu arto kaj la « bona lingvo » Esperanto bezonis identan flegadon ; en li, tiu arto fariĝis lia bona lingvo, lia lingvo strebanta esprimi la homan bonecon en la konstruado de kiel eble plej simplaj vojoj inter la bezonantoj de helpo kaj la eventualaj donontoj de tiu specifa helpo.*

*Li estis ĉe la pinto de sia kapablo donaci al ni ĉiuj la malavaran fluon de tiu unika spirito, kiun li kreis ; kaj neniu el ni estis preta aŭdi la drastan novaĵon, ke li tiel abrupte forlasis nin. Ni estas en stato de ŝokiĝo, kaj bezonos longan tempon por kunmeti niajn sentojn por pli inde esprimi al li nian omaĝon. Dume, en la nomo de UEA, mi komunikas al lia familio kaj liaj aliaj plej intimaj kunuloj la funebrajn sentojn de la tuta asocianaro pri la forpaso de tiu Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio, krom miaj propraj kondolencoj pri la forpaso de persona amiko.*

*Probal Dasgupta.*

Venontbultene ni publikigos aliajn kondolencajn mesaĝojn akompane al nekrologa artikolo rememoriga pri la multfacetaj vivo kaj aktiveco de Claude Piron. Sed en la nuna momento ni nur povas esprimi al Nicole kaj la aliaj Piron-familianoj nian simpatian kaj kunsuferon.

Claude Gacond.


Redaktas : Richard Schneller (rs), Höhenstrasse 1 b, CH-9300 Wittenbach,  
rischneller(ĉe)gmail.com. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

## Henri Vatré en la servo de la esperanta literaturo

En 2008 Henri Vatré iĝus centjara kaj samtempe estas la dekjariĝo de lia forpaso la 15an de decembro 1998 en Le Lignon apud Ĝenevo. Li naskiĝis la 19an de septembro 1908 en Ĝenevo (kvartalo Montbrillant malantaŭ la ĉefa stacidomo) kiel filo de Simon Vatré, aŭtoro de la signifa dialekta vortaro *Glossaire des patois de l'Ajoie et des régions avoisinantes* (Porrentruy 1947). Li esperantiĝis en 1927 pere Henriette Ith-Danneil, kunlaborantino de Pierre Bovet, kaj oficis ĉe UEA en 1931-1932 kiel ties bibliotekisto. Li laboris en 1933-1934 du jarojn en Budapeŝto ĉe la eldonejo Literatura Mondo. Inter 1959 kaj 1962 liaj recenzoj, poemoj kaj rememoroj aperadis en *La nica literatura revuo*; ankaŭ novelo, *La kimra Biblio* (kiun Kalocsay tradukis en la hungaran). Por Stafeto li kuntradukis (1958) *La floroj de l' malbono* de Baudelaire kaj verkis, pseŭdonime kiel Henri Baupierre, la pastîĉaron *Specimene* (1962), kies stilparodioj pri kvardeko da esperanto-verkistoj pruvis la jaman maturecon de literaturo kun tiom da distingeble propraj voĉoj.

Liaj postaj verkoj aperis plejparte ĉe Iltis, i. a. *Neologisma glosaro*

(kvar eldonoj ekde 1983), tradukoj el la romanoj *Nokta flugo* (1983) kaj *Tero de la homoj* (1985) de Saint-Exupéry, *Vort-statistikaj esploroj* (1986) kaj la poemaro *Disaj gutoj* (1989). Por UEA li redaktis kun Reto Rossetti duvoluman antologion de la esperanta novelarto, *Trezoro* (1989).



Kun karakteriza modesto, Vatré akceptis provlegi kaj prikonsili multajn esperanto-eldonaĵojn, de Stafeto kaj aliaj. Li i.a. indeksis la aŭtoritatan konsultverkon *Esperanto en perspektivo* (1974) kaj publikigis diversloke zorgajn vort-statistikajn esplorojn tra la verkoj de dekoj da esperanto-aŭtoroj. Ĉion ĉi li skrupule plenumadis malgraŭ pli kaj pli

regresa vidpovo. Laŭ omaĝa frazo de Régulo Pérez, Henri Vatré « ade mallumigis siajn okulojn por heligi la esperantan literaturon al nunaj kaj venontaj generacioj ». (rs)

(Fontoj : la reta enciklopedio *Vikipedio* kaj *Universalaj lingvoj en Svislando*.)

## La kimra Biblio

de Henri Vatré

*Al samideano Reto Rossetti*

Ĉion bone konsiderinte, la homojn oni povus dividi laŭ du kategorioj : tiuj, kiuj lernis la kimran lingvon kaj ... la aliaj. Al la dua kategorio mi apartenis, kaj verdire ne havis kaŭzon aparte plendi pri la sorto. Tamen, dum iu vintra, sendorma nokto, mi kuŝis en la lito, kaj pro ia mistera juko eksentis, ke mi plu ne povos esti feliĉa, se mi ne tuj transiros al la vicoj de la unua kategorio, kiu subite ŝajnis al mi la enviinda privilegio de la « happy few ». Tiun sopiron oni ne rigardu tute senbaza. Ĝi fontis el agrablaj junecaj rememoroj; ĝi radikis el tempofora dujara restado en kimra vilaĝo. Forgesita franca poeto skribis en konata soneto: « Ĉiu feliĉo, kiun la mano ne trafas, estas nur revo. » Por mi la feliĉo kompleze kuŝis je kelkmetra distanco. Kiam mi definitive forlasis Kimrion, Shani [1] min akompanis al la stacidomo, kaj donis elementan gramatikon kontraŭ

la promeso, ke mi studos ŝian belsonan lingvon. Siaflanke, ŝi promesis lerni Esperanton. La promeson ŝi lojale plenumis. Mi ne ! La kimra gramatiko dekomence dormis en iu kesto inter aliaj kadukaj libroj kaj paperaĵoj en la subtegmenta formetejo.

Rapide mi ellitiĝis, lumigis kandelon, nudpiede suprengrimpis al la alta ĉambro, kaj komencis traserĉi ĉiujn kestojn, kofrojn, valizojn. La akran malvarmon mi ne sentis. Fine mi trovis la libron « Welsh in a week » (La kimra lingvo en unu semajno) kaj trafolumis ĝin ravite, ne atentante la fakton, ke la aŭtoro estis humoristo. Intence mi skribas « estis », ĉar li jam forpasis post mistifikoplana vivo.

La reston de la nokto mi pasigis en la salono kun la libro, kajero kaj fontplumo. Febre mi parkerigis vortliston : agor (aperti), calon (koro), diolch (dankon), ktp. La tabelon de

la « mutacioj » t.e. ŝanĝiĝoj de la vortkomencantaj konsonantoj, propraĵo de la kimra lingvo, mi perfuneligiis en la kapon kun entuziasma avido kaj la tikla emocio, kiun donas la akiro de la scio :

Fy nghath (mia kato), ei gath (lia kato), ei chatch (ŝia kato) ... ktp.

Post tri monatoj, kiam la povra cerbo jam atingis la diskrekan punkton, mi ambiciis ataki la literaturon, la poezion de Dafydd ap Gwilym, de Ieuan Gwynedd, kaj la mirindan amlegendon de Tristram kaj Esyllt. Sed la necesan materialon mi ne sukcesis trovi. Ve, la feliĉo nun gravitis je distanco de pluraj astronomiaj lumjaroj !

– Ho Shan fach [2], kiel mi estus ĝojinta vin surprizi per letero en via patrina lingvo ! Iom sopire mi memoris pri Shani en la plena pompo de ŝia dekoka jaro, ne pensante, ke nun ŝi certe iĝis grizhara sinjorino kun eble du, aŭ tri gefiloj kaj eĉ ridetantaj nepoj. Reve mi elvokis la gajan, gastaman, ruĝbrikan hejmon de ŝia familio, la etan ĉambron, kiun mi okupis, la jam eluzitajn meblojn, la varman kamenon kaj la tekston de Johano 3.16, kiun ŝi mem alfiksis sur la muron:

« Canys felly y carodd Duw y byd ... » (Ĉar Dio tiel amis la mondon ...)

Subita lumo invadis mian konscion. La solvon mi ĵus trovis. Mi devas akiri ekzempleron de la kimra Biblio. Kaj komenciĝis longa, preskaŭ halucina, pilgrimo tra ĉiuj urbaj librejoj, butikoj, bibliotekoj. Mi konatiĝis kun librokolektantoj, brokantistoj, studamaj pastroj. Vane. La respondo sonis ĉiam senesperige

simila. Eĉ la delegito de la Biblia Societo asertis kun faka kompetento, ke la libro ne ekzistas.

Tamen ĝi ekzistas, mi ripetis al mi kun Galilea obstino. Ĉu mi mem ne riparos la difektitan ekzempleron de la kapelo Bethania en Rhosllanerchrugog ?

Mia serĉado ja ne restis tute senutila. Mi lernis, ke la Biblion oni tradukis en 1132 lingvojn, ke Dion oni nomas « Asdulaz » en la armena, « Deviyawahansay » en la cejlona, kaj simple « Boh » en la slovaka. Kaj ankaŭ pri la homoj mi multe lernis.

Mi jam rezignis pri plua ĉasado, kiam okaze de vojaĝo al najbara urbo, mi haltis antaŭ la butiko de S-ro Myers: « Aĉeto, vendo, interŝanĝo de novaj kaj jam uzitaj libroj. Okazaĵoj. Ekspertizo de malnovaj eldonaĵoj. » Mi provis.

S-ro Myers estis mezaĝa viro, malsane gracila, flava, kalva, kun neflegita barbo. Tra la dikaj lensoj, liaj okuloj aspektis kvazaŭ ŝtonoj funde de senviva akvo. Verŝajne li neniam havis patrinon, kaj jam ne-juna elmergiĝis el siaj libroj kiel produkto de spontana generado. Liaj lipoj aperigis surogaton de rideto kaj parolis bedaŭreme kun fremda akcento.

Mi klarigis al li la objekton de mia vizito.

– Kimran lingvon? li dube miris. – Ne, tion mi ne havas. Neniam aŭdis pri io tia.

– Sed la kimran lingvon, sinjoro, parolas du milionoj da homoj !

– Parolas, parolas ... ĉu oni verkis en ĝi ?

– Tutajn bibliotekojn. Riĉa literaturo, bela keltdevena lingvo plej interesa.

Kaj mi entuziasme perkrajonis sur slipon kelkajn vortojn por montri al li: « Llangollen, Llanfair, Llandudno [3] ... »

– Vortoj, kiuj komenciĝas per duobla « l »? duon-ironie, duon-suspekte demandis la sobra libristo.

– Nu, jes. Tiel elparoliĝas, – kaj mi provis imiti la « ll »-sonon iom similan al tiu, kiun eligas kolera kato fronte al minaca hundo.

– Tre interese ! acidis S-ro Myers.

– Vi neniam aŭdis pri Lloyd George, la fama ŝtatviro? Ankaŭ lia nomo ...

– Nura fantazio, komplete interrompis la fakulo. Certe temas pri pseŭdonima manio de verkisto. Ĉu vi jam vidis lian portreton, liajn harojn ?

– Portreton ? Ne. Sed la homon mem mi vidis.

– Vi vidis lin ? miris S-ro Myers kvazaŭ tiuj simplaj vortoj abrupte modifus lian ĝisnunan mondrigardon. – Permesu, li aldonis, mi tamen volas ion provi, mi telefonos al mia kolego Pouzet, kiu ofte proponas nekutimajn librojn. Momenton, mi petas ! Dume, vi povos traŝerci la bretojn tie kaj eble trovos ion interesan.

Kaj li rapidis al la postbutika ĉambro, kies pordon li diskrete kaj senbrue fermis. La bretoj plenplenis de ĉiaspecaj volumoj, kiuj dense, kunpremite montris siajn buntajn dorsojn, kiel la striojn de pristelaj spektroj, kiujn ĵus disordigis malica koboldo. Mi trarigardis, esploris : Sofokla tragedio, rusa Biblio, araba

lernolibro, japana poemaro, noveloj de O. Henry, Kritika historio de la hispana inkvizicio, de Llorente. Kaj sennombraj nekonatoj. Sed la kimraĵoj ŝajnis poreterne ekzilitaj el tiu kosmopolita mondo. Kaj trafulte mi ekvidis, meze de la nigra palisaro de plurvoluma germana enciklopedio, pli helan strion, maldikan dorson kun la surskribo « Y Pregethwr » (La Predikanto). Avide mi ĝin elminis. Se ne la tuta kimra Biblio, jen almenaŭ parto el ĝi. La prezo krajone notita sur la kovrilo estis ridinde bagatela.

Kelkajn minutojn mi atendis, poste senpacienciĝis. Jam vesperis kaj ekpluvis. Foriro urĝis por ne maltrafi la aŭtobuson. La telefonado plu daŭris. Mi frapis ĉe la pordo, kiu duon-apertiĝis : S-ro Myers parolis kun la aŭdilo ĉe la vango. Li manĝestis, ke mi atendu ankoraŭ momenton. Neeble. La monon mi ŝovis sur apudan tableton, prenis iun matenan gazeton el la paperkorbo, envolvis mian trezoron kaj rapidpaŝe foriris.

En la aŭtobuso, mi elpakis la libron, kiam miaj okuloj hazarde falis sur dikliteran artikolon en la gazeto ĉe la rubriko « Lokaj okazaĵoj » :

#### ATENTU

« La direktoro de la urba frenezulejo nin informas, ke unu el liaj gastoj forkuris dum la lasta nokto. Temas pri maniulo inklina viziti butikojn por fantaziaj verkoj, kiuj ekzistas nur en lia malsana imago. Okaze de renkontiĝo traktu lin milde kaj singarde, ĉar li povus fariĝi danĝera se incitita. Eventualajn in-

formojn bonvolu direkti al la urba policejo, telefono 32-45. Priskribo ... »

Sekvis persona priskribo, kiu korespondis iom ja al mia ekstera aspekto.

Mi devas konfesi, ke pli detalan kaj pli fidelan mi ankoraŭ neniam legis, pri mi mem.

*Sube de maldekstre: gesinjoroj Henri Vatré, Régulo Pérez, Andrée Gacond, gesinjoroj Haupenthal, foto de Claude Gacond (Creux-du-Van, 1973-08-07).*



## La sorto de *Tekste kaj Pretekste*

En la *Bibliografio de la verkaro de Henri Vatré*, kiun eldonis Reinhard Haupenthal en 1994, estas indiko por la jaro 1995: « *Tekste kaj Pretekste*. Kolektitaj verkoj. Editoris Reinhard Haupenthal. Chapecó

(SC): Fonto 1995. » Fakte ĉi tiu kolekto de prozaĵoj pro diversaj kialoj ne ankoraŭ povis aperi en presita formo, sed la tajposkripto troviĝas nun en la Kolekto Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko en Vieno

### Piednotoj

[1] Shani (elp. ŝani): kimra formo por Johana.

[2] Shan fach (elp. ŝan vaĥ,): kimra karesformo por Johana, laŭvorte: Johana eta.

[3] En la kimraj loknomoj « Llan » signas paroĥon kaj signifas « sankta ». Ekzemple: Llangollen = Sankta Collen. Llanfair = Sankta Maria.

(Unue aperis en *La nica literatura revuo*, n-ro 4/5, paĝoj 175-179.)

ĝis kiam troviĝos kuraĝa eldonisto konscia pri la valoro de tiu ĉi verko. Eble ekzistas malprava antaŭjuĝo ke la aŭtoro de la *Neologisma Glosaro* uzis multajn novismojn. Tio estas erara opinio ĉar en siaj propraj tekstoj novismoj ne pli oftas ol ĉe aliaj bonaj aŭtoroj. Vatré estis interesita pri vortstatistikoj por karakterizi la stilon de la diversaj beletristoj kaj per tio alvenis al la menciita glosaro.

### Atlantika baro

Henri Vatré rakontas en 1996 pri la malfacilaĵoj spertitaj por eldoni *Tekste kaj Pretekste* :

« En Kristnasko 1994 amiko Hauptenthal sendis al brazila eldonisto la kompletan kolekton de miaj prozaĵoj : 240 paĝojn en formato A4, kiun li parte mem tajpis kaj parte fotokopiis. Tri monatojn poste la eldonisto informis, ke li nenion ricevis, sed esperas, ke oni retrovos la pakajon, ĉar la brazila poŝto plenas de fantazio. Tiam amiko Hauptenthal rekopiis la tuton kaj ĝin sendis rekomendite. Tiam la brazila eldonisto anoncis, ke la unua sendaĵo mirakle troviĝis kaj ke li povas komenci la kompostadon. (...) Mi ne memoras kiom da tempo bezonis Kolumbo por traveli Atlantikon revene de Ameriko, sed sendaĵo el Brazilo ofte bezonas tri monatojn por atingi Eŭropon. Tion mi plurfoje persone konstatis, kiam mi abonis la brazilan revuon *Fonto*. »

Oni povas mem konstati tion legante la rakonton *La kimra Biblio* aperintan unue en *La nica literatura revuo* kaj kiun mi malkovris lastatempe sur la reto ĉe OLE (Originala literaturo Esperanta).

La libro kovras periodon pli ol kvindekjaran de la esperanta literaturo de 1934 ĝis 1989 kaj konsistas el impresiga nombro da recenzoj aperintaj en diversaj revuoj ofte prestiĝaj. Sekvas rakontoj, antaŭparoloj kaj postparoloj, scenoj, omaĝoj, lingvo kaj literaturo, diversaĵoj kaj pastiĉoj el *Specimene* (1962). Reinhard Hauptenthal titolis sian enkondukon *Suvereno de la kurto kaj koncizo* kaj trafe karakterizas la stilon de Vatré. (rs)

—ooOOoo—

### El Disaj gutoj :

*La brizo mole lulos  
betulajn branĉojn  
dum la folioj  
jam flavaj falos lante  
kun niaj iluzioj*



Henri Vatré preleganta pri *Literatura Foiro*. (Renens 1971-10-2/3.)



## Svisaj elektoj en 2007

*La elektoj de la federacia parlamento montris ĉi-foje pli akrajn kampanjojn de la partioj kaj la elektoj de la Federacia Konsilio surprizis eĉ spertajn observantojn.*

Por memoro: en 2003 la Svisa Popolpartio / Unio demokrata de la Centro (SPP/UDC) atingis signifan plifortiĝon, kio fine kaŭzis la anstataŭon de la federacia konsilanto Ruth Metzler (Kristandemokrata Partio KDP) per Christoph Blocher, tiama ĉefo de la Popolpartio, kiu eniris kiel dua reprezentanto de ĉi tiu partio en la Federacian Konsilion (kolegara registaro sepmembra elektita de la parlamento, la prezidanto ŝanĝiĝas ĉiujare laŭvice). Antaŭe Blocher estis kritikanto kaj opoziciulo al la registaro, kaj nun li iĝis membro de la Federacia Konsilio. Li sukcesis pliseverigi la leĝojn pri eksterlandanoj kaj rifuĝintoj, sed ne al ĉiuj plaĉis lia politika stilo ĉar li kelkfoje transpasis la rajtojn ligitajn al sia funkcio. Lia politika stilo, influita de sia kariero kiel entreprenisto de la multnacia kemio-firmao Ems ne plaĉis al ĉiuj parlamentanoj.

Jam delonge multaj membroj de diversaj partioj (socialistoj, verduloj, partoj de la kristandemokratoj kaj liberaluloj) deziris forigi lin de lia posteno, sed dum la popolaj elektoj de la parlamento en oktobro 2007,



la socialdemokrata partio perdis seĝojn kiuj profitis al la SPP/UDC, kiu siavice iĝis per 29% la plej forta partio. Laŭ la prognozoj de preskaŭ ĉiuj politikaj komentistoj, la elekto por la registaro ne

multe ŝanĝus la konsiston de la registaro : 2 socialdemokratoj, 2 liberaluloj, 2 popolpartianoj kaj 1 kristandemokrato. (Ili devas regi kolegame, en Svisio ne ekzistas partio

kiu regas kaj opozicio, kiu prenas la povon kiam ĝi gajnis la elektojn.) Preskaŭ neniam okazis ke ministro ne estis reelektita se li prezentis sin por elektoj kaj ne demisiis propravole. La sola kazo en la lastaj kvindek jaroj estis precize tiu de Ruth Metzler en 2003.




Kvankam la svisaj civitanoj ne rekte povas elekti la prezidanton de la Konfederacio (li havas preskaŭ nur reprezentajn funkciojn), la elektoj ĉiujn kvar jarojn de la registaro en la parlamento ĝenerale pasiigas la helvetojn. Ĉi-foje la balotoj estis streĉe interesaj, ĉar nur lastmomente troviĝis 51-jara kandidatino kuraĝanta alfronti la ĉefon de sia propra partio, Christoph Blocher, kaj – ne atendite – ŝi estis elektita kun dek pliaj voĉoj ol Blocher. Tio montras ke ĉi tiu lasta agacis eĉ parlamentanojn el propra kampo.

Oni vidis nekutiman bildon en la parlamentejo : unu flanko freneze aplaŭdis kaj mangestis dum la alia flanko estis konsternita. Ankaŭ surstrate kaj en la laborejoj okazis similaj scenoj. La virinoj kontentas, ĉar nun estas tri virinoj en la registaro (plus la kanclerino, la registara proparolanto) kaj kvar viroj.

Blocher kaj lia partio diris ke ili daŭre faros politikon en la opozicio, sed fakte ili ambaŭ jam antaŭe estis en la opozicio. Cetere Blocher kondukis kiel opoziciulo en la registaro, dum la nova ministrino Evelyn Widmer-Schlumpf (kvankam el la sama partio) estos probable pli interkonsentema. Tamen ŝia tasko ne estos facila, ĉar la Svisa Popolpartio eksigis ŝin (kiel ankaŭ Samuel Schmid, la dua sampartia ministro reelektita) el la partia frakcio de la parlamento. (rs)

## Faŭsto de J. W. Goethe, partoj I kaj II

Fine de 2007 aperis la dua volumo de la mondfama dramo en traduko de Willy Nüesch.



Ĝi estas multebena kaj filozofia dramo pri la scivolema Faŭsto kaj lia pakto kun la diablo. D-ro Faust estas maljuna filozofo, kiu strebas ekkoni la esencon de la mondo. Enamiĝinte al junulino (Grenjo/Gretchen) li cedas al la tento de la diablo (Mefistofelo), sed poste saviĝas pro sia « ĉiama strebado » al supera celo. Lia savo tamen ne inkluzivas lian amatinon kaj ilian infaneton. (*Laŭ Vikipedio*)

—ooOOoo—

J. W. Goethe, Faŭsto. Tragedio. Eld. W. Nüesch, Berno 2007. Parto I, 155 paĝoj, 12.60 €. Parto II, 257 paĝoj, 18.60 €.

*El la unua parto de la tragedio. Nokto. En altvolba, strikta, gotika chambro. Faŭsto maltrankvila sur sia seĝo ĉe pupitro.*

*Faŭsto.* Mi nun, aĥ ! pri filozofio,  
Jurisprudenco, medicin',  
Kaj bedaŭrinde teologio  
Ĝisfunde studis kun arda inklin'.  
Jen mi stultulo staras nun  
Kiel antaŭe en mallum' !  
Mi estas magistro, eĉ doktoro,  
Kaj tiras jam en dekjara laboro  
Tien, reen, sor kaj bas,  
Miajn lernantojn je la naz' –  
Mi vidas ke nia scio nulas,  
Pro tio ĉi preskaŭ mia koro  
forbrulas.

Mi ja pli saĝas ol ĉiuj filistroj,  
doktoroj, skribistoj, pastroj,  
magistroj ;  
Skrupuloj kaj duboj min ne  
deprimas,

Mi nek inferon nek diablon timas –  
Sed mi nenian ĝojon plu havas,  
Miaj sciaĵoj neniel gravas,  
Mi ne iluzias min, povi instrui,  
Al homa bonig' kaj konvert'  
kontribui.

Mi ankaŭ havas nek bonon, nek  
oron,

Kaj ne honoron, ne mondogloron ;  
Eĉ hundo ne volus plu tian ĉi vivon !  
Mi tial elektis magio-aktivon,  
Por ke spiritaj fort- kaj vortprocedoj  
Sciigu min eble pri mondsekretoj.  
Por ke mi ne plu kun acida ŝvitado  
Bezonu paroli pri l' nesciata,  
Ke mi ekkonu, kio enkerne  
La mondon kuntenas plej interne,  
Ekvidu semojn kaj agofortojn,  
Kaj ke mi ne plu trafosu nur vortojn.

# Indekso enhava de *SES informas* Jaro 2007

Favore al retrovo de artikoloj kaj de informoj aperintaj en nia organo jen indekso de la pasinta jaro 2007.

La redaktoro: Claude Gacond.

**Atentigo** : Pro komputilaj problemoj okazis plurmaniera paĝigo de la tri unuaj numeroj. Pro tiu ni uzas la sekvajn mallongigojn :

**ev** por **Esperanto-vivo**

**kp** por **Kulturaj paĝoj**

**t** por **Teknosofio**

**vs** por **Vivo de SES.**

**Aliaj mallongigoj** :

e-a = esperanta

e-ista = esperantista

e-isto = esperantisto

e-o = esperanto

i-a = internacia

n = numero

p = paĝo

ps = pseŭdonomo de

vd = vidu

*Titolo de libro aŭ periodaĵo*

## A

Abegg Max : n3kp27-28.

Aebi Traugott Rinaldo : n2vs17, n3vs27, n4p11.

*L'affère Pecârd* (tr. Stich) : n4p33.

Afriko : n1p1.

Aïvanhov O, M. : n2p3-4, n3p3.

Aleksandro la Granda : n4p8.

Allemand Luc : n2vs14, ev7, n4p4, 14.

Altherr Anita : n2vs9, vs11, vs17, n4p10.

*Aniario* (tr. Auld) : n4p9.

Apius Guido : n1vs4.

Ariste Paul : n4p35.

Auld William : n3ev16, n4p7-8, 36.

## B

Bachmann Louise : n4p17.

Baghy Julio : n4p8.

Balmelli Enrico : n3ev22.

Baur Arthur : n1ev5, n3vs25, kp25.

Baur-Sallenbach Heidi : n1sv1, n3vs25.

*Belarto* : n4p9.

Bélisle Marion : n2vs14.

Béatrix-Koleva Sonia : n2vs17, n3p1, ev17.

Béatrix Nicolas : n3p1, ev17.

Bérourd-Focke Nicole : n2vs10, n4p24.

Bickel Andres : n1vs4, n2vs6, vs11, n4p17.

Binder Eduard : n4p18.

Blanc Maillard Charlotte : n2vc14.

Blanc Claude : n1vs16.

Blanke Detlev : n1ev5.

*La bona lingvo* (Piron): n1ev2.

Bormann : n4p36.

Borsboom Ed. : n3kp25, kp28, n4p23.

Boulton Marjorie : n4p9.

Bouvier Paul : n1ev5.

Bovet Pierre : n3kp26.

*Brasikfolio* : n1ev1.

BEA = Brita E-o-Asocio : n1ev5.

Brouwer Anke : n2vs14.

Brügger Franz : n1sv1.

Brun Sonja : n1vs4, ev3, n2ev11-12, n3ev20, n4p17.

Bubis Ignaz : n4p39.

Buhlmann David : n2vs17, n4p24.

Buller Osmo : n3vs22

Burri Elisabeth : n1ev5.

## C

Carlevaro Tazio : n1ev5, n2vs16, n3vs19-20, ev22, kp25, n4p11, 36.

Carlevaro Teresita : n2vs16, n4p11.

CED = Centro de E-o-Dokumentado : n1kp2.

CDELI = Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo I-a : n1p1, vs1, vs2, ev2-5, n2vs7, vs10, vs13-15, ev6-8, p3, n3p1, vs19-20, vs26, ev14-15, ev17-19, ev22, kp25, p3, n4p1, 4, 13-16.

Cerani Antoine : n2kp18.

Ceresole Pierre : n3ev22.

La Chaux-de-Fonds : n1vs1.

Chabes-Walder Gabriel : n2vs17.

Charles-Cerani-Ćišić Jeanne : n2kp18-19.

Chaves-Walder Verena : n1ev3, n2vs17, ev12, n3ev21, n4p17.

Cherpillod André : n1ev5.

Chmielik Tomasz : n1ev5, n3kp27.

Chong Yeong Lee : n4p21.

Ćišić Mehmed aŭ Meho : n2kp18-19.

Civil-Servo I-a = SCI : n3ev22.

Civito (Literatura Foiro) : n3kp26.

Common Charmian : n2ev9-10.

Comptoir Suisse : n1vs1, vs2, n2vs7.

*La conquête des esprits* (Eudes) : n3 kp22.

Cool Gerard : n1ev5.

*Coopzeitung* : n3vs21-22.

Cornuet Didier : n2vs16, n4p11.

Corti Anuta : n3kp26.

Corti Walter : n3kp26.

Cotton Armand : n1ev5.

Couchevin Pascal : n4p25.

Cseh Andreo : n3kp26-27.

Cueni Raphaela : n3vs27.

## Ĉ

Ĉernušanko : n4p36.

Ĉeŝihin : n4p36.

Ĉivilihin : n4p36.

## D

*Dall'alto della locomotiva* (Balmelli) : n3ev22.

Dante : n4p7, 31.

Daŝgupto Probal : n3vs18, vs23, n4p21.

Daum Thomas : n4p27.

De Faveri Fernando : n3ev22.

*Le défi des langues* (Piron) : n3kp20.  
 Déhon Gilbert : n2vs14.  
 Deklaracio de Tyresö (1969) : n1kp5.  
 Deléglise Pierre : n2vs14.  
 De Mestral Dominique : n1ev2.  
 De Mestral Elisabeth : n1ev2, n2vs10.  
 De Sabates H. : n4p10.  
 De Sassi Mauro : n4p24.  
 De Saussure Ferdinand : n1kp8.  
 Dettling Annelies : n1ev3, n4p17.  
 Di Vetta Arlette : n2vs7.  
 Dobrzyński Roman : n4p38-40.  
 Döring Erna : n4p15, 23-24.  
 Donzé Gérard : n4p14.  
 Dornier Marcel : n1ev5.  
 Dovat Jacques : n1vs1.  
 Dovat Lucienne : n1vs1, n2vs16.  
 Dreyfuss Ruth : n4p25.  
 Drezén Ernest : n3kp25.  
 Duc Gonninaz Michel : n4p36.  
 Ducommun Edouard : n2vs14-15.  
 Dürrenmatt : n3kp27.  
 Duličenko Aleksandr : n4p34-35-37.

## E

Ederveen Derk : n1ev5.  
 Eisenegger Gertrud : n2vs16.  
 Ekspozicio *E-o kaj Interlingvistiko en Svislando* : n4p24.  
 Ekumena E-o-Kongreso : n4p19.  
*Elektitaj poemoj kaj maksimumoj* (Goethe) : n1kp9.  
*En barko senpilota* (Auld) : n4p9.  
*English Only Europe* (Phillipson) : n3kp22.  
*En la serĉado de la mondolingvo aŭ interlingvistiko por ĉiuj* (Duličenko) : n4p34-35.  
 Ernst Rolf : n2p2, t1, n3p2, vs24.  
*E-a Antologio* (red. Auld) : n4p9.  
 La E-a Gazetejo : n3vs26.  
 Esperantic Studies Foundation : n1kp5.  
*E-o aktuell* : n4p40.  
*E-o* (UEA) : n4p21.  
 E-o-Edukistaro de Svislando : n3ev22.  
 E-o-Land : n2ev13.  
**E-o organizaĵoj lokaj:**  
**Basel** : ESB = E-o-Societo Basel : n1ev1, n2ev8, n3ev19, n4p15, 23.  
**Genève** : E-o-Grupo La Stelo : n1ev1, n2vs7, ev8-10, n3ev19, n4p12, 15.  
**Kantono de Neuchâtel** : n3ev19, n4p16.  
**Lausanne** : LES = Laŭzana E-o-Societo : n1ev1-2, n2ev10-11, n3ev20, n4p16-17.  
**Luzern** : LES = Lucerna E-o-Societo : n1ev3, n2ev11-12, n3ev20, n4p17.  
**Saint-Genis-Pouilly** : EGR = E-o-Genève-Régions : n2vs10, ev8-9.  
**Wil** : E-o-Klubo Wil : n1ev3, n2p1, vs10, ev12-13, n3ev21, n4p17.  
**Zürich** : ESZ = E-o-Societo Zürich : n1ev3, n3ev21, n4p18.  
 EPA = E-o Populariga Asocio : n4p21.  
*E-o Radio Arkivo* : n3vs24.  
*E-o triumfonta* : n3kp27.

*Espero por la mondo: spirita galvanoplastiko* (Aïvanhov) : n2p4, n3p3.  
 Eszperantó-Rádió Jászberény : n3vs23.  
*Etnismo* : n2vs9, n4p29, 33-34.  
 Eudes Yves : n3kp22.  
 EEU = Eŭropa E-o-Unio : n1vs7, vs9, n4p10.  
 Eŭropa Unio : n1kp2, n2ev10.  
*L'Express* : n1p1.

## F

Farbskatol' : n3vs25.  
 Favre Alain : n1kp6, n2vs7.  
 Favre Jacqueline : n2ev9.  
*Feliĉu, eblas!* (Aïvanhov) : n2p3.  
 Fiedler : n4p36.  
 Filali Renata : n4p17.  
 Fischer Henriko : n3kp27.  
 Fischer Kurt : n3vs22.  
 Fischer Olivia : n1p1, n2vs10, ev12-13, n4p18.  
 Fischer-Schmitter Wolfram : n2p1, vs9, ev12-13, n3ev21.  
 Fontannaz Nancy : n1vs4, ev5, p1, n2p2, vs14, vs17, ev7, n3p2, vs19-20, ev20, n4p7, 9, 14.  
*Fonto* : n4p9.  
 Francis John Islay : n4p7.  
 Fregonara Odette : n2vs17.  
 Früh Alice : n3kp26.

## G

Gaál Gyözö : n1ev5.  
 Gacond Andrée : n1ev5, p3, n2vs17, n3vs25.  
 Gacond Claude : n1p2, vs2, vs4, ev2, ev4-5, p3, n2p2, vs7-8, vs13, vs15-16, ev6-7, n3p1-2, vs19-20, vs25, ev14-15, ev20, ev22, kp25-27, p4, n4p4, 13-14, 24.  
 Gacond François : n2vs16.  
 Gantert Ghyslaine : n2ev9.  
 Gastejo Edmond Privat : n1vs1.  
 Giusta Giuseppe : n1ev5.  
 Glättli Ernst : n2vs16, n3ev17.  
 Gloor Alfred : n1ev5.  
 Godé-Darel Valentine : n2kp18.  
 Goethe : n1kp9, n3ev16, n4p5.  
 Goetheanum : n4p5.  
 Graf Bruno : n1vs5, n2vs6, vs8, n3ev16, kp25, n4p5, p9, 22-23.  
*La granda kaldono* (Francis) : n4p7.  
 La Grande Ourse (lernejo) : n1ev5, n2vs9, vs14.  
 Grin François : n2ev10, n3vs18, vs21.  
 Grosjean Joëlle : n2vs14, n4p21.  
 Grosjean Mireille : n1p2, vs1, vs2, vs5, n2p2, vs6-9, vs14, vs16, ev7-8, n3p2m vs21, n4p1-3, p11-12, 15, 20-22.  
 Grosjean Yvon : n1vs1.  
 Grossmann Hans-Werner : n1p2, vs4, p3, n2p2, vs7-8, vs13, vs17, n3p2, vs27, n4p11-12, 23.  
 Grupo de Etoy : n2vs6, vs10-12.  
 Guegen Raymond : n1ev5.  
 Guldin Margrit : n1vs1.  
 Gutzwiller Felix : n4p27.

## H

Haas Fritz : n3kp27  
 Haazen Jo : n3vs23.  
 Handzlik G. : n4p10.

Handzlik Malgorzata : n4p10.  
 L'Harmattan (eldonejo) : n4p29.  
 Haupenthal Reinhard : n1ev4, p4, n2ev6, n3ev14-15, ev18, ev21, n4p13.  
 Heer Renate : n4p11.  
 Herder Gottfried : n1kp9.  
 Hillel : n1ev3.  
*Historio de la Mondolingvo* (Drezen) : n3kp25.  
*Hodler en Mostar* (Štimec) : n2kp18.  
 Hodler Ferdinand : n2kp18-19.  
 Hodler Hector : n2kp18-19, n3kp26.  
 Homaranismo : n4p8, 36.  
 Huguenin Agnès : n3vs27.  
 Huguenin François : n2vs16, n3vs27.  
 Huguenin Noël : n2vs16, n3vs27, n4p11.  
 Humair Jacques-André : n1ev5.  
*Humoroj* (Auld) : n4p9.

**I**  
 Ido : n3kp25, n4p36.  
 Iltis : n3kp26.  
*L'Impartial* : n1p1.  
*La infana raso* (Auld) : n4p7-9.  
 Interlingua : n3kp25.  
 ICK = I-a Centra Komitato de la E-o-Movado : n3kp26.  
 IEI = I-a E-o-Instituto : n3kp27.  
 IJK = I-a Junulara Kongreso : n3vs20.  
 IKUE : n4p19.  
 I-a Seminario (Würzburg) : n4p16.  
*I-isto* : n2p3  
 IKEL : n2vs9  
 ILEI = I-a Ligo de E-istaj Instruistoj : n1ev4, n2ev6-7, n3ev14, ev18, n4p11, 14.

**J**  
 Jaccard-Besson Marguerite : n2vs14, n3vs27.  
 Jacob Hans : n3kp26-27.  
 Janton Pierre : n3kp21.  
 Janzing Gereon : n4p32-33.  
 Japana E-o-Instituto : n4p18.  
 Japana E-o Libro-Kooperativo : nqev5.  
 Jayet Marguerite : n2vs17.  
*La jogo de nutrado* (Aïvanhov) : n2p4, n3p3.  
 Johannot Anne-Marie : n2vs7.  
 John-Calame Francine : n4p1-3.  
 Jomo : n4p10.  
 Jubilea agado 2003-2004 : n2vs8, vs13.

**K**  
*Kajeno* (Gloor) : n1ev5.  
 Kalocsay : n4p8-9.  
*Kannibalen und Schamanen* (Janzing) : n4p33.  
 Kantona Konferenco de Edukdirektoroj : n4p26.  
 Kanzi Ito : n4p36.  
 Keller Sanjiv : n2kp12.  
 Keller Stefano : n1p2, vs2, ev5, p3, n2p2, n2vs6, vs11, vs17, ev7, n3p2, vs18-20, vs27, ev20, n4p1, 4, 9, 11, 13, 18.  
 Kelso David : n4p23.  
 Kessler Alice : n4p24.  
*Kiu lingvo estas vere natura?* (Grin) : n3vs18, vs21-22.  
 Kleriga Komisiono de la Nacia Konsilio : n4p25-26.  
 Koller Aloïs : n2vs17.

Konkurso Esperanto : n4p11.  
 Konsilio de Kantonoj : n4p26.  
 Korjenkov Aleksandr : n1ev5, n4p34, 37.  
 Korkut Emina : n2kp19.  
 Kreuz : n3kp27.  
 KELI : n4p19.  
 Künzli Andreas : n1vs1, ev5, kp1, n2vs7, vs14, ev8, kp19, n3vs19-20, vs22, vs25, kp25-28, n4p12, 25, 34, 38.  
 KCE = Kultura Centro E-ista : n2vs8, n3kp26, n4p15, 24.  
 Kultura Seminario (CDEL) : n1vs2, ev4, n2vs10.  
*Kuriero de E-o* : n4p24.  
*Kvaropo* (Auld, Francis, Rossetti, Dinwoodie) : n4p9.

**L**  
 Lapenna Ivo : n1kp2, n4p8, 36.  
 Lauper Elisabeth : n2vs13.  
 Lavanchy Jean-Jacques : n2vs17.  
 Le Puil Jak : n4p23.  
 LeQuint Armelle : n4p23.  
 Levrat Christian : n4p25.  
 Libro-Foiro en Genève : n2vs10, ev8-9.  
 LF-koop : n4p36.  
 Ligo de Nacioj : n1kp3, n3vs21.  
*Linguistic Imperialism* (Phillipson) : n3kp22).  
 Lingvo francprovenca : n1kp7.  
*Lingvo kaj Popolo* (Tonkin) : n1kp1-5.  
 Lingvo romanča : n4p28-34.  
 Lins Ulrich : n4p36.  
 Linstedt Jouko : n1kp6.  
*Literatura Foiro* : n4p38.  
*Literatura Mondo* : n3ev18, kp26, n4p14.  
 Luther Martin : n4p31.

**M**  
 Mamin Jeanne : n2vs16.  
 Manders W.J.A. : n1ev5, n4p36.  
 Manifesto de Prago (1996) : n1kp5.  
 Manifesto de Raŭmo (1980) : n1kp5.  
 Margot Nicole : n1vs7, n2vs8-9, n4p28.  
 Marksismo-leninismo : n4p36.  
*La mastro de l' ringoj* (tr. Auld) : n4p9.  
*Le Matin bleu* : n3vs20.  
 M'Bow : n1kp3.  
 Meier Hans : n2vs16-17, n4p11.  
 Meierhofer : n3kp27.  
 Melnikov Aleksandr S. : n4p36.  
 Menzi Peter : n3vs27.  
 Mettler Rosa : n4p17.  
 Mevo Mad = ps. Stakian Madeleine.  
 Meyer C. F. : n3ev16, n4p5.  
 Michelet : n1kp8.  
*La Migranto* : n4p24.  
 Mihajlova Fani : n4p23.  
 Mihalkov Georgi : vd. Modest Julian ps.  
 Modest Julian : n4p22.  
 Molnar Monika : n1ev5, n2vs9, vs14, ev7, n4p14.  
 Montagut Abel : n4p23.  
 Müller-Noget Alice : n3kp26.  
 Muriset Steve : n4p16.

**N**  
*Naŭ poetoj* (Iltis) : n3kp26.

Nercessian Anahide : n3kp26.  
Nettle Daniel : n1kp7.  
*Neue Zürcher Zeitung* : n4p27.  
Newman Barry : n3kp20.  
Nicolodi Carlo : n2vs16.  
Nitobe-simpozio : n1kp2, n4p36.  
Nobel-Pacpremio : n4p1-4.  
*Norda prismo* : n4p9.  
Novak Ljudmila : n4p10.  
Nüesch Willy : n1kp9, n3ev16, n4p5-6.  
Nurmekund Pent : n4p35.

## O

Obradovic (familio) : n4p10.  
Occidental (lingvo) : n3kp25, kp27.  
Olsson Kerstin : n3kp28.  
*La Ondo de Esperanto* : n2kp19.  
Oomoto : n4p21-22.  
*Oraj reguloj por la vivo ĉiutaga* (Aïvanhov) : n2p4, n3p3.  
OSIEK = Organiza Societo de I-aj E-o-Konferencoj : n4p22-23.  
Ó Rian Seán : n4p10.  
Ortelli Luciano : n2vs17.  
Ory Gisèle : n4p1-2.

## P

*Pajleroj kaj stoploj* (Auld) : n4p9.  
*Parlons espéranto* : n4p29.  
*Parlons francoprovençal* (Stich) : n4p29, 33.  
*Parlons romanche* (Stich) : n4p29, 32, 34.  
*Parlons Schwyzertütsch* (Stich) : n4p29, 34.  
Parzival : n3vs27.  
*Pasporta Servo* : n3vs22.  
*Paŝoj al plena posedo* (Auld) : n4p7.  
Pellaton Ginette : n2vs15-16.  
Pérez Régulo : n4p8,  
Perret-Gacond Chantal : n2vs16.  
Perret-Gacond François : n2vs16.  
Pestalozzi-projekto : n3kp26-27.  
Petit-Jean Philippe : n2vs14.  
Phillipson Robert : n3kp22.  
Pietri Lucien : n3kp28.  
Pilipovič S. & A. : n4p10.  
Piron Claude : n1vs5, ev1, ev2, n2vs6, vs11, vs14, ev8, kp11, p3-4, n3kp20, kp25, p3, n4p36.  
Piron Nicole : n4p11.  
Pochanke Stanislaw : n1vs4.  
Pola Radio : n3vs24.  
*Praga Manifesto* 1996 : n1kp3.  
Privat Edmond : n3kp26-27, n4p36.

## Q

Queneau : n4p10.

## R

Radio Aktiva : n3vs24.  
Radio Havana Kubo : n3vs24, n4p3.  
Radio Itala Internacia : n3vs24.  
Radio Rio de Janerio : n3vs24.  
Radio Verda : n3vs24.  
*Rätoromanisch Wort für Wort* (Janzing) : n4p32, 34.  
Randin François : n2vs14, n3ev20, n4p17.  
Reale Cesco : n4p16.  
Reich-Ranicki Marcel : n4p39.

Reise Know-How : n4p32.  
Rembrandt : n3kp26.  
RERO = réseau romand : n1ev5, n4p14.  
Rey Anna : n1ev3, n2ev11, n3ev20, n4p17.  
Rey Konrad aŭ Koni : n1vs4, ev3, n2ev11, n3ev20, n4p17.  
Reymond Mady : n3vs27.  
Riedle Luise : n3kp27.  
Rieser Willi : n2vs16.  
*Rimleteroj* (Auld, Boulton) : n4p9.  
Ringli Heinrich : n4p23.  
Rivière Jimmy : n4p24.  
Robertson John : n3kp27.  
Rochat-Girod André & Marianne : n4p11.  
Rodolfo la tria : n1ko7.  
Romaine Susanne : n1kp7.  
Rooke Dieter : n1vs4, n4p15.  
Roosevelt : n1kp8.  
Rousseau Jean-Jacques : n1kp9.

## S

Sägesser Daniel : n3vs22.  
Sandoz-Giroud André : n1p3, n2vs8, vs15-16, n4kovrilpaĝe. p19-20.  
Sandoz André (urbestro) : n1vs1.  
Sasseli Albertini : n3ev22.  
Scherer Margrit : n1ev3, n2ev12, n3ev20, n4p17.  
Scherer Paul : n1vs4, ev3, n2ev12, n3ev20, n4p11, p17.  
Schiller Friedrich : n3ev16, n4p5.  
Schleyer Johann Martin : n1ev4, p4, n2ev6., n3ev14-15, ev18, n4p13, 36.  
Schlimmer A. : n4p10.  
Schmid Heinrich : n4p31.  
Schmutz Hermann & Jeanne : n4p23.  
Schneller Martine : n1p1, ev5, n2p3, n3p3, n4p14-15.  
Schneller Richard : n1p2, kp1, p3, n2p2, ev12, kp11, n3p2, kp20, n4p15, 25.  
Schöni Bartoli Daniel : n3ev20.  
Schweizer Hildegard : n4p23.  
Schweizer Kurt : n1ev5, n4p23.  
Sekelj Tibor : n1kp3.  
Seko Jamasaki : n4p21-22.  
Senn H.-P : n1ev1.  
SAT = Sennacieca Asocio Tutmonda : n4p15, 23-24.  
Shakespeare : n1kp9.  
Sigrist Liliane : n2p1.  
Silfer Giorgio : n3ev16, kp26, n4p5, 7-9, 36.  
Sixtus Christiane : n1vs4. ev1, n2vs8.  
Sobiela-Caanitz Guiu : n4p30.  
Spalinger Berthe : n1ev1.  
*La speranza del 2000* (Balmelli) : n3ev22.  
Stakian Madeleine : n1ev5.  
Steiner Rudolf : n3ev16, n4p5.  
Stich Dominique : n4p29, 31.  
*Stilekzercoj* (Queneau) : n4p10.  
Štimec Spomenka : n2kp18-19.  
Stojan : n3kp27.  
Studsabato : n1vs2, ev4.  
*Sub la regno de la kolombo : paco regu* (Aïvanhov) : n2p4, n3p3.  
*Sudrejna Kuriero* : n4p24.

SUFO = Socia kaj Media Forumo de Orienta Svislando : n2ev12-13.  
 Svisa Alpa-Klubo : n1p4.  
 SAEF = Svisa Asocio de E-o-Fervojistoj : n3ev22.  
*Svisa Enciklopedio Planlingva: Universalaj linvoj en Svislando* (Künzli red.) : n1vs1,vs2, ev5, n2vs7, vs14, ev8, n3vs19-20, kp25-28, n4p18.  
 Svisa ILEI-Sekcio : n1vs2, n2ev7-8, n3kp26.  
 SES = Svisa E-o-Societo : n1vs1-5, ev4, n2vs6-17, ev6-8, n3vs18-27, ev14, ev16, ev18, kp25, n4p1-12, 14-15, 24.  
*SES informas*: n1vs2, p3, n4p4.  
*Svisa Konstitucio* : n4p26.  
 Svisa Radio Internacia : n3vs25, ev20, kp26.  
 Szerdahelyi Istvan : n4p36.

## T

Tacuo Huĝimoto : n4p22.  
 TANEF : n4p24.  
 Teknosofio : n2t1-3.  
*Le Temps* : n4p4.  
 Tiĉina E-o-Ligo : n3ev22.  
 Tisljar Z. : n4p10.  
 Tonkin Humphrey : n1kp1-5, n4p36.  
 TEJO = Tutmonda E-a Junulara Organizo : n1kp2, n3kp27.  
 TEJO-Kongreso : n3kp28.  
 Tutmonda Festivalo de la Tero : n1kp8.

## U

Unesko : n1kp3, kp5.  
 Unesko-rezolucioj 1954 Montevideo kaj 1985 Sofio : n1kp2-3, n4p2, 8.  
 UEA = Universala E-o-Asocio : n1vs2, ev4-5, kp1-5, n2vs9, ev6-7, kp18, n3vs18, vs22-23, ev14, ev18, kp27, n4p1-4, p11, 14, 23, 36.  
 UK = Universala Kongreso de Esperanto : n1kp6, n2vs9, n3vs18, vs20, vs23, n4p18, 21, 24, 36, 39.  
 Universitato Adam Mickiewicz (Poznan) : n1kp1.  
*Unufingraj melodioj* (Auld) : n4p9.  
 UN = Unuiĝintaj Nacioj : n1kp3, n3vs21.  
*Urax und Rezabell* (Dornier) : n1ev5.  
 Usono : n1kp8.

## V

*Vanishing Voices* (Nettle + Romaine) : n1kp7.  
 Van Pujenbroek B. J. & R. : n4p11.  
 Vatré Henri : n3kp26.

Vatré-Baudin Juliette : n3kp26.  
 Vengerov : n4p36.  
 Vikipedio : n4p12.  
 [vingt quatre] *24 Heures* : n1ev2.  
 Viredaz Marguerite : n2va17.  
*Vitrato* (Francis) : n4p7.  
 Vitry Noëlle : n2vs16.  
*Vivo de Andreo Cseh* (Borsboom) : n3kp26-27.  
 Vogel Dietmar : n2sv16.  
*Vojaĝo ĝis noktofino* /Céline) : n4p23.  
 Volapük : n1ev4, n2ev6, n3ev14, kp25, n4p13.  
 Von Büren Jean-Thierry : n1ev5, n2vs10, 14.  
 Von Wahl Edgar: n4p36.  
*Vortoj de Andreo Cseh* (Borsboom) : n3kp27.

## W

Wagner J. : n4p10.  
 Walder Elsbeth : n1vs1.  
 Waldvogel Edouard : n3ev22.  
 Waldvogel Jean-Emile : n3ev22.  
*The Wall Street Journal* : n3kp20.  
 Waringhien Gaston : n4p36.  
 Wassmann Fritz : n4p11.  
 Weidmann Dietrich : n1p2, vs2, n2p2, vs6, 9, n3p2, vs18, vs21-22, n4p12, 18.  
 Weidmann Jasmin : n2vs7.  
 Weidmann Linda : n2vs7.  
 Weidmann Nelida = Nelly : n1ev3, n2vs7, n4p18.  
 Wells John : n4p36.  
 Werner Erich : n2vs17.  
 Wettstein Henri : n4p11.  
*Wieso ist Occidental die endgültige Welthilfssprache?* (Haas) : n3kp27.  
*Winterreise* (Schubert) : n1ev5.  
*World Speaks English* (Newman) : n3kp20.

## Z

Zaleski-Zamenhof Louis-Christophe : n4p38-34.  
 Zamenhof Adam : n4p39.  
 Zamenhof Lejzer : n1kp8, n2p3, n3ev15, ev18, p3, n4p8, 13, 36, 38-39.  
*La Zamenhof-strato* (Dobrzyński) : n4p38-30.  
 Zelenin : n4p36.  
 Zoller Marie : n2vs10, ev9.

-oOo-



# Svisa kalendaro

## Februare

- 2 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
- 4 : Lausanne : LES : Ĝenerala asembleo.
- 5 : Genève : La Stelo : Kunveno.
- 8 : Zürich : ESZ : Ĝenerala kunveno.
- 9 : Luzern : LES : Ĝenerala kunveno.
- 12 : Basel : ESB : Kunveno : Karnavalo.
- 13 : Chaux-de-Fonds : Vespera grupa kunveno.
- 16 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.
- 28 : Basel : ESB : Kunveno : Angla vespero.

## Marte

- 3 : Lausanne : LES : Kunveno.
- 4 : Genève : La Stelo : Ĝenerala asembleo.
- 5 : Luzern : LES : Kunveno.
- 10 : **Redakta datlimo de SES informas.**
- 11 : Chaux-de-Fonds : Vespera grupa kunveno.
- 15 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.
- 27 : Basel : ESB : Kunveno : Ludo/Scrabble.

## Aprile

- 2 : Luzern : LES : Kunveno.
- 4 : **Limdato por proponoj al la Ĝenerala Kunveno de SES.**
- 7 : Lausanne : LES : Kunveno.
- 12 : **Berno : SES : Ĝenerala Kunveno.**
- 19 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.
- 24 : Basel : ESB : Kunveno : Filmo.

## Maje

- 5 : Lausanne : LES : Kunveno.
- 7 : Luzern : LES : Kunveno.
- 29 : Basel : ESB : Kunveno.

## Junie

- 7 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.

- 10 : **Redakta datlimo de SES informas.**

- 11 : Chaux-de-Fonds : Vespera grupa kunveno.
- 11 : Luzern : LES : Kunveno.
- 21 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.
- 26 : Basel : ESB : Kunveno : Grün' 80.

## Julie

- 9 : Luzern : LES : Kunveno.
- 17 : Basel : ESB : Kunveno ĉe Bérout-Focke.

## Aŭguste

- 8 : Luzern : LES : Vespera ekskurseto.
- 24 : Bettingen : ESB : Ekskurso.

## Septembre

- 3 : Luzern : LES : Kunveno.
- 10 : **Redakta datlimo de SES informas.**
- 25 : Basel : ESB : Kunveno.

## Oktobre

- 1 : Luzern : LES : Kunveno.
- 4 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
- 18 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.
- 23 : Basel : ESB : Kunveno.

## Novembre

- 1 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
- 12 : Luzern : LES : Kunveno.
- 15 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.
- 27 : Basel : ESB : Kunveno.

## Decembre

- 6 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
- 10 : Luzern : LES : Kunveno.
- 13 : Basel : Zamenhofa festo.

## Venonta redakta datlimo de SES informas: 2008 Marte 10

La gvidantoj de la lokaj kaj fakaj societoj bonvolu atenti pri la venonta datlimo redakcia por la periodo aprila-junia de la venonta *SES informas* 2008-2, kiu aperos komence de aprilo 2008. Ili informu pri la datoj de la kunvenoj por la monatoj aprilo-majo-junio-julio 2008 kaj eĉ por la resto de la tuta jaro 2008. Kaj ili ne forgesu raporti pri okazintaĵoj. Antaŭdankas pro tiu redakta kunlaboro Claude Gacond, CP 480 2301 La Chaux-de-Fonds. [gacond@bluewin.ch](mailto:gacond@bluewin.ch)